

# Lingviko, Politikiko kaj Ekblek

Jonathan Pool  
The Long Now Foundation

## *Resumo*

Kvankam la romano *1984* de Orwell ne estas scienca verko, oni trovas tie la ideon de lingvo kiel politikan ilon kaj plurajn implicajn hipotezojn laŭ tiu ideo. La reganta partio de unu el tri grandaj imperioj en la mondo enkondukas novan lingvon per ŝanĝoj al la tradicia lingvo. Esperantlingve ni uzas la nomon *Ekblek* por indiki la enkondukatan oficialan lingvon kaj *Eksblek* por indiki la tradician lingvon. Laŭ la lingvopolitika teorio de *1984*, ŝtato ja povas fari al la ĉefa lingvo de la popolo ŝanĝon tian, kiel tiu de *Eksblek* al *Ekblek*, kaj tiaj lingvaj ŝanĝoj igus la uzantojn de la nova lingvo malpli kapablaj kritiki politikajn asertojn, kaj fari politikajn juĝojn kaj decidojn. Esperanto estas grandparte simila al *Ekblek* pro la komunaj trajtoj de reguleco, simpleco kaj ĝeneraleco. Sed la ekzistantaj atestaĵoj pri la politika konduto de esperantistoj ne apogas la opinion, ke scipovo de Esperanto sufiĉas por subpremi kontraŭregistaran politikan pensadon. Ĉi tiu provizora studeto estis prezentita unuafoje dum la 69-a Universala Kongreso de Esperanto, 21-28 julio 1984, en Vankuvero, Kanado.

## *Abstract*

Although Orwell's novel *1984* is not a scientific work, we find there the idea of language as a political tool and several implicit assumptions according to that idea. The ruling party of one of the three great empires of the world introduces a new language – *Newspeak* – instead of *Oldspeak*, the traditional one. According to the of language policy theory in *1984*, it is possible for a totalitarian state to operate such a change as from *Oldspeak* to *Newspeak*, and this linguistic change would make the users of the amended language less able to criticize political statements and so to make political judgments and decisions. Orwell's *Newspeak* has some common features with Esperanto such as regularity, simplicity and generality. But the studies we have on the political behavior of esperantists do not support the thesis that the use of Esperanto is sufficient to suppress anti-government political thinking. This provisional study has been presented for the first time in the 69<sup>th</sup> World Congress of Esperanto, 21-28 July 1984, in Vancouver, Canada.

### Riassunto

Sebbene il romanzo *1984* di Orwell non sia un lavoro scientifico, troviamo qui esposta l'idea del linguaggio come strumento politico e diverse ipotesi implicite in questa idea. Il partito di governo di uno dei tre grandi imperi del mondo introduce una nuova lingua al posto di quella tradizionale. Qui usiamo il nome *Neolingua* per indicare la nuova lingua ufficiale e *Exlingua* per indicare la lingua tradizionale. Secondo la teoria politica linguistica di *1984*, uno stato totalitario sarebbe in grado di operare sulla lingua di una popolazione un cambiamento come quello da *Exlingua* a *Neolingua*, e tale cambiamento linguistico renderebbe più difficile per i parlanti criticare affermazioni politiche, esprimere giudizi e prendere decisioni sul tema. La *Neolingua* di Orwell ha alcune caratteristiche comuni con l'esperanto, quali regolarità, semplicità e generalità. Ma le osservazioni che abbiamo sul comportamento politico degli esperantisti non supportano la tesi che l'uso dell'esperanto sia sufficiente per sopprimere il pensiero politico antigovernativo. Questo breve saggio è stato presentato per la prima volta nel 69esimo Congresso Mondiale di Esperanto, 21-28 Luglio 1984, a Vancouver, Canada.

### 1. Enkonduko

Dum la jaro 1984 okazis multaj prelegoj kaj aperis multaj artikoloj kaj libroj pri la kontraŭ-utopia romano *1984* de George Orwell. Tiu romano prezentas la vivon en nova brita imperio, kiun regas la plena diktatoreco de sola partio. La partia ŝtato ne nur uzas fizikan forton por puni kaj do malinstigi kontraŭpartian agadon, sed ankaŭ uzas lingvan manipuladojn por malhelpi aŭ eĉ malebligi kontraŭpartian pensadon.

1984 kaj ĝiaj ideoj pri la perlingva pensregado estas ne nur produktoj de unu homa menso. Ili estas bazitaj parte sur faktaj fenomenoj, kaj ili esprimas vaste akceptatajn opiniojn. Tion lastan oni konstatas per la fakto ke ĵurnalistaj kaj popolanaj kritikoj pri ŝtataj miskondutoj ofte mencias Orwell, la romanon, kaj diversajn unue tieajn objektojn por ecigi tion kion ili mallaŭdas. Do, studante la lingvajn ideojn de Orwell, ni studas la lingvajn ideojn de homamasoj.

La romano *1984* provokas nin serĉi la respondon al la demando, ĉu ŝtato povas aliigi lingvon uzatan en la teritorio de tiu ŝtato kaj, se jes, ĉu per tio la ŝtato povas limigi la povon de sia popolo rezoni pri la politiko. Pli detale, ĉu tiaj lingvaj manipuloj, kiajn Orwell prezentas en *1984* estas eblaj kaj, se jes, ĉu ili igus la uzantojn de la koncerna lingvo politike obeemaj kaj nekritikemaj?

## 2. Teoria ĉirkaŭaĵo

La ĝenerala formo de nia demando havas du erojn, kaj al ĉiu oni povas jesi aŭ nei. Rezultas do kvar bazaj ideoj pri la ŝtata perlingva penslimigado. Tabeligante tiujn ideojn, ni povas nomi ilin jene:

	Ĉu ŝtato povas aliigi lingvon?		
		Ne	Jes
Ĉu lingvaj aliigoj povas limigi la povon de homoj rezoni pri la politiko?	Ne	Lingvo kiel politika kanalo	Lingvo kiel politika produkto
	Jes	Lingvo kiel politika forto	Lingvo kiel politika ilo

La ideo de lingvo kiel *politika kanalo* supozas nek ke ŝtatoj povas manipuli lingvojn nek ke lingvaj ŝanĝiĝoj povas limigi la homan penskapablon. La strukturisma kaj raciisma skoloj de lingvostudado ĝenerale akceptas tiun ideon, interalie Noam Chomsky.

La ideo de lingvo kiel *politika produkto* supozas ke ŝtatoj povas aliigi lingvojn sed neas ke la rezultaj aliigoj povas limigi la rezonpovon de la popolo. Oni vidas tiun ideon ĉe pluraj skoloj, i.a. la Esperanto-movado, la soveta lingvoscienco dum la influo de Marr, kaj la nuntempa empiria socilingvistiko.

La ideo de lingvo kiel *politika forto* supozas ke lingvoj aliigās per ne-intencaj procezoj, ne per ŝtata agado, sed ke la nature okazantaj ŝanĝoj ĉe lingvoj povas limigi la politikan penspovon. La skolo de lingva relativeco, kies ĉefa nomo estas Benjamin Whorf, iuj analizoj pri la potencrilatoj inter sociaj grupoj, ekzemple tiuj de George Lakoff, kaj pluraj eseoj pri la ŝanĝoj observeblaj ĉe unuopaj lingvoj – eĉ tiu de George Orwell mem pri la angla, aŭ tiuj de Mario Pei, kiuj ankaŭ pritraktis interlingvistikon kaj aparte Esperanton – baziĝas sur tiu ideo.

La ideo de lingvo kiel *politika ilo* supozas ke ŝtatoj povas aliigi lingvojn kaj ke lingvaj aliigoj povas limigi la politikan penspovon. Oni trovas tiun ideon ĉe la verkoj de iuj kritikantoj pri la politika retoriko kaj pri la politiko de vorta ‘proprigismo’ (nomata ankaŭ ‘purigismo’), laŭ kiu fremde devenajn vortojn oni anstataŭigu per vortoj indiĝenaj aŭ kunmetaj. Krome, almenaŭ unu nuna esploranto pri la lingvopolitiko de novaj ŝtatoj trovis atestaĵojn por tiu ideo.

Ŝtatoj ofte klopodas aliigi lingvojn. Interalie, ili klopodas skribebligi lingvojn, vorte riĉigi lingvojn, vorte proprigi lingvojn, kaj gramatike

vorte normigi lingvojn, kaj uzatigi aŭ maluzatigi lingvojn. La ideo pri lingvo kiel politika ilo asertas ke tiaj klopodoj povas sukcesi kaj ke tia sukceso plu havas kromajn efikojn. Inter tiaj kromefikoj, la politika rezonado de la koncerna ŝtatanaro povas ŝanĝiĝi. Pli precize, ties povo rezoni pri politikaj problemoj povas, pro ŝtate kaŭzitaj lingvaj ŝanĝoj, malpligrandiĝi.

La implicoj de tiu ideo de lingvo kiel politika ilo ne haltas tie. Se ŝtato povas per lingva manipulado limigi la povon de sia popolo pensi logike pri la politiko, la ŝtato povas per tiu ilo limigi la povon de la popolo kontraŭi la ŝtaton. Per lingva manipulado la ŝtato povas malebligi kritikan pensadon kaj malpovigi la popolon trovi mallogikaĵojn en la politikaj deklaroj kaj teoriaj verkoj de la ŝtato. Sekve, lingvoj povas helpi al regantoj gardi sian regon, simile al la helpo kiun ili ricevas de sia speciala dispono pri prestiĝo, mono, scio, kaj aliaj rimedoj.

### 3. La lingvopolitika teorio en 1984

Kvankam 1984 tute ne estas scienca verko, oni trovas tie la ideon de lingvo kiel politika ilo kaj plurajn implicajn hipotezojn laŭ tiu ideo. Orwell prezentas sian specon de tiu ideo rakontante pri nova lingvo. La reganta kaj sola partio de Oceanio, kiu estas unu el tri grandaj imperioj en la mondo de 1984, enkondukas tiun novan lingvon per ŝanĝoj al la tradicia lingvo de la impericentra popolo, la angla. La partio ne plu agnoskas laŭnome la ekziston de angla lingvo. Anstataŭe, ĝi uzas la nomon *Newspeak* por indiki la enkondukatan oficialan lingvon kaj *Oldspeak* por indiki la tradician lingvon. Kvankam alikaze oni decidis traduki tiujn nomojn en Esperanto laŭvortere per 'Novlingvo' kaj 'Malnovlingvo', mi opinias ke oni povas pli ĝuste rekrei la sent-efikon, tradukante *Newspeak* per 'Eksblek' kaj *Oldspeak* per 'Eksblek'.

La lingvopolitika teorio de 1984 ujas, resume, la jenajn supozojn:

1. Solpartirega ŝtato povas fari al la ĉefa lingvo de la popolo tiajn ŝanĝojn, kiajn la ŝtato de Oceanio faris al Eksblek, kreante Eksblek.
2. Tiaj lingvaj ŝanĝoj, kiaj okazis dum la transiro de Eksblek al Eksblek, igus la uzantojn de tiu ŝanĝita lingvo malpli povaj unuopulece rezoni pri politikaj problemoj, kritiki politikajn asertojn, kaj fari politikajn juĝojn kaj decidojn.

Iajn lingvajn ŝanĝojn Orwell prezentis maldetale. Pri la reguloj de frazkonstruado li skribis preskaŭ nenion. Pri la reguloj de la parola stilo li skribis ke Eksblek estas babila, stakata, kaj monotona. Pri la prononco li skribis ke iuj vortoj ŝanĝiĝis, kaj ke la ŝanĝoj igis ilin pli

facile prononceblaj, pli mallongaj, pli rapide direblaj, pli senakcentaj, pli raŭkaj, kaj pli malbelaj. Pri la literumado li skribis nur ke oni foje aliigis vortojn por plifaciligi la prononcadon.

Aliajn ŝanĝojn li tamen pli detaligis. Tiuj estas ŝanĝoj de la signifo de vortoj kaj ŝanĝoj de la reguloj pri la derivado kaj fleksiado de vortoj. Vortsignifoj ŝanĝiĝis ĉefe kvin-kiele. Unue, la plej multaj vortoj iĝis unusignifaj. Due, iuj novaj vortoj ekestis kun po du malaj signifoj. Trie, iuj novaj vortoj ekestis kun signifoj ne esprimeblaj per solaj vortoj de Eksblek. Kvare, iuj signifoj esprimeblaj per solaj vortoj de Eksblek ne plu esprimeblis per Ekblek. Kvine, pluraj politikaj esprimoj plimallongiĝis per kuniĝoj de vortstumpoj kaj tiel iĝis malpli facile analizeblaj per la signifoj de siaj eroj.

Mi ilustras tiujn ŝanĝojn per analogaj ekzemploj de eventualaj ŝanĝoj ĉe Esperanto, por ne devi diskuti detale la vortaron de la angla. Se, do, Ekblek estus malpraa Esperanto, estus freneze diri “Vi kaj mi estas egalaj”, ĉar “egala” signifus ‘matematike samvalora’ kaj nenion pli. Politika egaleco malaperintus el la signifo de tiu vorto. “Nejesulo” estus politika vorto kun du malaj signifoj. Kiam oni aplikus ĝin al malamiko de la partio, ĝi fiigus lin per la aserto ke li neas veraĵojn kaj jesas malveraĵojn. Sed oni povus uzi ĝin ankaŭ por laŭdi lojalan partianon, kaj tiam ĝi signifus ke li ĉiam jesas aŭ neas laŭ la partia linio kaj eĉ povas maligi sian opinion pri io tuj, se la partio tion ordonas, forgesante ke li antaŭe havis la malan opinion. “Bleki” havus pli ĝeneralan signifon ol en la nuna Esperanto, ĉar ĝi uĵus ankaŭ la signifon de “paroli”. Do ne nur bestoj sed ankaŭ homoj blekus, kaj la vorto “paroli” ne plu ekzistis. “Malulo” havus signifon por kiu oni bezonas plurajn vortojn en Esperanto: homo kiun la partio eksigis el la trovebla historio kaj, se li tiam vivis, ankaŭ mortigis. Ne ekzistis vorto en Ekblek kun la signifo de “scienco”, kaj tiu vorto mem estus forigita el la lingvo. Kiel fina ekzemplo, la ideologio de la partio, kiu nomiĝus “Brita Socialismo” en Esperanto, mallongiĝus al “Briso” en Ekblek, kaŝante la implican sed dubindan aserton ke ĝi vere estas brita kaj vere estas socialisma.

La dua detale prezentita lingva ŝanĝaro en 1984 estas novaj reguloj pri derivado kaj fleksiado. Neformale difinate, derivado estas la procezaro per kiu oni ŝanĝas la frazan rolon aŭ la signifon de vorto. Fleksiado estas la procezaro per kiu oni elektas inter la subroj de iu vorto en iu fraza rolo. Ŝanĝi substantivon al verbo aŭ statverbon al agverbo estas ekzemploj de derivoj. Ŝanĝi ununombran adjektivon al plurnombra estas ekzemplo de fleksio. La derivaj kaj fleksiaj reguloj de Ekblek malsimilis al tiuj de Eksblek kvar-kiele.

Unue, Eklek estis pli *regula*. Ĝi ne plu ujis la plej multajn esceptojn de Eksblek. Ekzemple, dirinte *good* por la signifo ‘bona’, oni uzis la regulan sufikson *-er* kaj diris *gooder* por la signifo ‘pli bona’, anstataŭ la neregula Eksblekaĵo *better*. Simile, ĉe Eklek oni regule fleksiis la antaŭe neregulajn substantivojn rilate al la nombro kaj la antaŭe neregulajn verbojn rilate al la tempo.

Due, Eklek estis pli *simpla*. Kvankam Eksblek uzis plurajn regulojn por unu celo, Eklek uzis nur unu regulon por unu celo. Ĉe Eksblek, ekzemple, oni derivis adjektivon el substantivo per pluraj diversaj finaĵoj kaj eĉ per tutaj vort-anstataŭigoj. Ĉe Eklek, tiaj derivaĵoj okazis ĉiam per unu sama regulo, sufiksi la substantivon per “ful”. Ni rigardu kelkajn tiajn derivaĵojn:

	<i>Adjektivo</i>		
<i>Substantivo</i>	<i>Eksblek</i>	<i>Eklek</i>	<i>Signifoj</i>
crime	criminal	crimeful	krim/o/a
speed	speedy	speedful	rapid/o/a
wood	wooden	woodful	lign/o/a
place	local	placeful	lok/o/a

Trie, Eklek rilate al derivado kaj fleksiado estis pli *ĝenerala*. La reguloj estis uzeblaj ne ĉe iuj vortoj sed ĉe ĉiuj vortoj. El iu ajn substantivo oni povis fari adverbos; el iu ajn adjektivo oni povis fari ĝian malon; kaj tiel plu. Ĉe Eksblek, kontraŭe, ekzistis multaj malpermesoj kontraŭ la aplikiĝo de iuj reguloj al iuj vortoj, aŭ kontraŭ iu ajn aplikiĝo de iuj reguloj. Ekzemple, por maligi iun ajn vorton de Eklek oni povis prefiksi ĝin per *un-*. Jen kelkaj tiaj derivaĵoj:

<i>Eksblek</i>	<i>Eklek</i>	<i>Esperanto</i>
bottom	untop	malsupro
defeat	unwin	malvenko
dark	unlight	malhela
left	unright	maldekstra
poorly	ungoodwise	malbone
differently	unsamewise	malsame
waste	unsave	malŝpari
urinate	undrink	maltrinki
on the contrary	unwise	male

Kvare, la derivado kaj fleksiado de Ekblek estis pli *regata*. La reguloj nek de Eksblek nek de Ekblek estis sufiĉe precizaj por ke oni povu precize antaŭscii la formon de nova vorto havanta iun signifon. Se, ekzemple, per la prefikso *un-* oni forĵetebbligis unu el du male signifaj vortoj, iu devis decidi kiun konservi kaj kiun forĵeti. Ĉe Eksblek, tiajn decidojn faris la tuta lingvanaro per procezo de reciproka influado kaj neformala interkonsentado. Ĉe Ekblek, tiajn decidojn faris la tuta lingva fako de ŝtata instanco. Reguleco, simpleco, ĝeneraleco, kaj regateco estas, do, la ecoj de la derivado kaj fleksiado kiuj pliiĝis dum la transiro de Eksblek al Ekblek.

Laŭ la implica teorio pri lingvopolitiko en 1984, la menciitaj lingvoŝanĝaj specoj, precipe rilataj al la signifoj de vortoj kaj la reguloj pri derivado kaj fleksiado, povas rezulti de ŝtata lingvoregado kaj povas siavice helpi al la ŝtato limigi la povon de sia popolo rezoni unuopulece pri politikaj aferoj. Ekblek, laŭ Orwell, samtempe faciligis por-partian pensadon kaj malfaciligis kontraŭ-partian pensadon. Parolantoj de Ekblek povis rapidege respondi al iu ajn politika demando aŭ aserto per la ĝusta frazo, ĉar Ekblek minimumigis la bezonon pensi antaŭ paroli. Laŭ la aŭtoro, ĝi estis preskaŭ perfekta ilo per kiu oni povis “elŝpruci la ĝustajn opiniojn tiom aŭtomate kiom mitralo elŝprucas kuglojn [...] Oni esperis ke korekta lingvaĵo iam povos elflui el la laringo tute sen kunlaboro de la pli altaj cerbaj centroj”. Ekblek ankaŭ servis por apartigi la popolon kaj la ideojn de la estinteco. Laŭ Orwell, homoj povantaj legi Ekblek ne povus per tio legi Eksblek, almenaŭ se la tiulingva teksto ujus politikajn aŭ filozofiajn vortojn, ĉar tiuj vortoj nun aŭ havus tute malsamajn signifojn aŭ simple ne plu ekzistus.

Tiaj lingvaj ŝanĝoj, laŭ la teorio de Orwell, efikus ne ĉiujn homojn en la koncerna ŝtato, sed nur tiujn kiuj lernis la ŝanĝitan lingvon. En Oceanio, la plimulto de la loĝantaro restis ekster la politika sistemo kaj la nova kulturo. Ilia manko de konscio similigis ilin pli al bestoj ol al homoj kaj igis nenecese instrui al ili Ekblek por ke ili ne ribelu. Ekblek estis ilo por regi la pensojn de la edukita popolero. La implica supozo en 1984 estas ke, se la ŝtato sukcesos anstataŭigi Eksblek per Ekblek ĉe tiu parto de la popolo, la ebleco de liberiga revolucio por ĉiam malaperos.

#### 4. Teorio kaj faktoj: Ekblek kaj Esperanto

Je la unua penso, la teorio pri lingvopolitiko kiun oni povas trovi implica en la romano 1984 ŝajnas praktike neprovebla. Esploristo ne povas emigi ŝtaton multe ŝanĝi sian ĉefan lingvon, nur por konstati

ĉu la ŝtato sukcesos kaj ĉu, se jes, la politika penspovo de la koncerna lingvanaro post tio rapide malpliigoŝos. Tamen, ekzistas faktoj kiuj nerekte atestas pri la supozoj de tiu teorio.

Unue ni konsideru la demandon, ĉu ŝtato povus ŝanĝi ĉefan lingvon tiel kiel la oceania ŝtato ŝanĝis Eksblek en 1984. Parto de la provo pri tiu supozo povus esti konstato pri ĉu Ekblek-speca lingvo estus eĉ ebla. Se ne, oni ne devus plu demandi kiel oni povus ĝin krei. Do, ĉu Esperanto estas Ekblek-speca lingvo? Se jes, la ebleco de tia lingvo estas jam pruvita.

Grandparte oni povas prave aserti ke Esperanto estas ekblekeca. La plena dudirekta konsento inter la distingaj sonoj kaj la skribaj literoj de Esperanto, kaj la regula akcento de Esperanto, faciligas kaj do rapidigas ĝian prononciĝon. Esperanto, kompare kun la eŭropaj lingvoj de kiuj ĝi prenis la plejmulton de siaj vortoj, ĝenerale havas pli multajn vortojn sen pluraj baze malsamaj signifoj, kiel notis interalie Toon Witkam. Ĝi certe ankaŭ havas pli multajn vortojn kiuj ne estas tradukeblaj al aliaj lingvoj per solaj vortoj. La grandaj reguleco, simpleco, kaj ĝeneraleco de la reguloj pri derivado kaj fleksiado ĉe Esperanto estas vaste konataj kaj ne bezonas atestaĵojn.

Parte, tamen, Esperanto ne estas ekblekeca. La vortoj de Esperanto esprimas plurajn proksimajn signifojn proksimume samofte kiel tiuj de la ĉefaj eŭropaj lingvoj. Esperanto ne pli ol aliaj lingvoj ujas vortojn kiuj esprimas malajn politikajn signifojn laŭ la situacio. Ŝajne ne ekzistas konceptoj esprimeblaj per aliaj lingvoj kaj tute ne esprimeblaj per Esperanto. Esperanto eĉ malpli ol pluraj ĝiaj devenaj lingvoj kreas vortojn per kunmeti stumpojn de aliaj vortoj. Kaj la derivado kaj fleksiado de Esperanto ne estas, kompare kun tiuj aliaj lingvoj, tre regataj.

Kelkaj ecoj de Ekblek mankantaj al Esperanto tamen ĉeas aliajn lingvojn. Tiuj estas la ekzisto de male signifaj politikaj vortoj, la ekzisto de stumpe kunmetitaj vortoj – ekz. *kolkhoz* kaj multaj aliaj en la rusa, *cointelpro* kaj multaj aliaj en la angla – kaj la regado de ŝtataj instancoj pri la derivado kaj fleksiado, ĉefe ĉe konscie evoluigataj lingvoj de ekskolonioj kaj ĉe la teĥnikaj terminoj de iuj lingvoj kun jam modernaj vortstokoj.

Restas do nepruvitaj la ebleco ke la ĝenerala vortprovizo de lingvo uju nur plene unusignifajn vortojn kaj la ebleco ke ideoj esprimeblaj en unu lingvo ne estu esprimeblaj en alia. Pri ambaŭ eblecoj ekzistas granda dubo. Kvankam teorie oni povus disigi la apartajn signifojn de ĉiuj vortoj per vortkreado, tio tiom obligus la grandon de la vortstoko ke estas dubinde ke homoj povus lerni tian lingvon. Kaj, laŭ multaj lingvistoj,



lingvoj ĉiam povas esprimi antaŭe neesprimitajn ideojn, kondiĉe ke oni sufiĝe zorge strebu per la ekzistaj rimedoj.

Estas ne surprize ke Ekblek plurkiele similas al Esperanto, ĉar Orwell pasigis multan tempon kun E. Lanti kaj aliaj aktivaj esperantistoj kaj en Parizo kaj en Londono, kiel atestas la biografio de Crick. Orwell ankaŭ konis aliajn lingvajn fenomenojn kiuj eble kontribuis al liaj ideoj pri Ekblek, interalie la Bazan Anglan, la telegrafan lingvouzon de ĵurnalistoj, diversajn lingvajn ideojn de aliaj verkistoj, kaj la publikan lingvouzon en la gazetaro, la sociaj sciencoj, kaj la ŝtataj instancoj. Tamen, la gramatiko de Ekblek baze similas pli al tiu de Esperanto ol al tiu de la Baza Angla; ekzemple, oni rajtas prefiksi nur 50 adjektivojn de la Baza Angla per *un-* por maligi iliajn signifojn, dum oni rajtas prefiksi iun ajn vorton de Ekblek kaj de Esperanto per la respektiva maliga prefikso. La plena ĝeneraleco de la reguloj pri derivado kaj fleksiado ĉe Ekblek kaj Esperanto kreas altan gramatikan muron inter ili kaj aliaj lingvoj. Krome, eĉ se Ekblek iel similas al la Baza Angla, tiu ne estas funkcia lingvo, do ĝi ne povas helpi al la proviĝo de la teorio de Orwell.

Manke de kontraŭaj indikoj, ni devas supozi ke ĉiuj ecoj de Ekblek helpis al la oceania ŝtato subpremi la politikan rezonpovon ĉe sia popolo. Esperanto, do, havante plurajn komunecojn kun Ekblek, povas servi kiel almenaŭ parta provilo pri la dua ero de la teorio, la supozo pri la pensefikoj de ekblekecaj lingvaj sanĝoj. Se tiu supozo veras, ni povas atendi ke Esperanto-uzantoj malpli kritike kaj malpli unuopulece pensas pri politikaj problemoj ol homoj kiuj ne scipovas Esperanton, kaj ke esperantistoj povas pensi pli lerte kiam ili komunikas per ordinara lingvo ol kia rilate al derivado kaj fleksiado ol Esperanto, kaj se la komunikado ne rilatus al eventualaj stumparaj vortoj en la kompara lingvo.

La ekzistaj atestaĵoj pri la politika konduto de esperantistoj ne apogas la kredon ke esperantlingva scipovo sufiĉas por subpremi kontraŭreĝiman politikan pensadon. La sociologia esploro de Forster trovis ke la anaro de Brita Esperanto-Asocio estas, statistike, iom pli randema politike kaj religie ol la cetera loĝantaro de Britujo. Krome, interne de la Esperanto-movado mem ŝajnas ekzisti almenaŭ tiom da disputado kaj displitiĝemo rilate al la politiko de la movadaj instancoj kiom oni trovas ĉe alispecaj movadoj kies anoj ne lernis Esperanton. Se, do, ekzistas tiaj efikoj kiajn Orwell prognozis, ili estas tro subtilaj por konstato per observi amasajn kondutojn.

Ĉu, do, per pli preciza mezurado kaj eksperimentaj metodoj oni povus trovi la prognozitajn pensefikojn? Por provizore sondi tiun eblecon,

oni povas prezenti al esperantistoj problemon de politika rezonado kaj konstati ĉu ili rezonas pli sukcese kiam ili ricevas tiun problemon per Esperanto aŭ kiam ili ricevas ĝin per alia lingvo. Laŭ la teorio de Orwell, ili devas malpli efike rezoni kiam ili komunikas per Esperanto.